

Diru tridek tri

[el la Itala Esperanto-Federacio revuo "L'esperanto"]

de Renato Corsetti

1) Skribu tiel, kiel vi parolas!

Mi decidis proponi al la redaktanto de ĉi tiu revuo la novan rubrikon "Diru tridek tri". La rubriko celas atentigi italojn pri lingvaj aspektoj rilate al la uzo de Esperanto. Demandoj de la legantoj kaj petoj pri artikoletoj pri ĝeneralaj problemoj estas bonvenaj. Sendu ilin al renato.corsetti@gmail.com

En ĉi tiu unua artikoleto de la rubriko estas utile pritrakti tre ĝeneralan problemon.

Vi skribas por la legantoj ne por vi mem. Pro tio provu skribi kiel eble plej simple. La unua regulo estas: skribu tiel, kiel vi parolas.

Italujo havas sian lingvan historion, pro kiu la popolo devis kompreni, ke tiuj, kiuj estas potencaj kaj riĉaj kaj prestiĝaj, ofte parolas en lingvo malsama ol la simplaj popolanoj. La plej amuza variaĵo de tio estas la policano, kiu skribas: "*Il detto Giuseppe Rossi si è recato nel piano sottostante il livello del piano terra*", por diri: "*Giuseppe Rossi è andato in cantina*".

La plej konata nuntempa variaĵo estas tiu de la televida ĵurnalisto, kiuj aldonas vorton en la angla en ĉiu frazo, por distingi sin de la aŭskultantoj.

La tria variaĵo, kiu ofte iel surfaciĝas en artikoloj en ĉi tiu revuo, estas la lingvo-variaĵo de politikistoj, kies ĉefa regulo estas: neniam diru ion simplan (*proverò a trovare i soldi per costruire un ponte qui*), sed diru ion ĝeneralan kaj abstraktan, kiu estu laŭeble interpretebla plurmaniere (*La nostra gestione concretizzerà dei tentativi di reperimento di risorse finanziarie, allo scopo di assicurare la realizzazione delle opere ritenute opportune in questo territorio*).

Sekvi unu el tiuj modeloj estas malbone por homo, kiu volas verki en Esperanto, lingvo internacia, kiu devas esti komprenata ankaŭ de koreoj kaj usonanoj, por ne preterlasi germanojn kaj kongolandanojn.

Do, evitu frazojn de ĉi tiu speco:

Tie formiĝis forta grupo de ekonomiaj agantoj, kiuj, en la kadro de loka organizaĵo, elektis partopreni kune en grava projekto kaj difini komunajn celojn kaj vojojn, ĉar ili opinias ke eblas disvolvi fortajn sinergiojn por turisma/kultura evoluo kaj sukceso de Roccasecca dei Volsci, kunmetante ilin per efika agado progresiga kaj disvastiga de Esperanto.

La frazo estas nur parte inventita por igi la verkintojn nerekoneblaj. Antaŭ ĝi koreoj kaj usonanoj simple rezignus kompreni pri kio temas.

Oni povus tre pli rekte diri:

Ekestis forta grupo de entreprenistoj kaj negocistoj en Roccasecca dei Volsci [Rokaseka-dei-volŝi]. Ili kreis lokan organizaĵon, kiu okupiĝos pri grava projekto. Ĉi tiu projekto difinos komunajn farendaĵojn, kiujn ili plenumos kune, por igi la urbon Roccasecca dei Volsci urbo turisme sukcesa. Samtempe tiu agado helpos Esperanton progresi kaj disvastiĝi.

Mi ne komentas ĉi-foje pri tio, ke verkante longajn frazojn (kiel tiun cititan supre) oni ofte restas en dubo, ĉu "kunmetante" estas gramatike ĝusta en Esperanto kiel la subkuŝanta itala "mettendo insieme", kiu, tamen, ne bezonas havi la saman subjekton, kiun havas la ĉefa frazo.

Tio estu temo por unu el la venontaj rubrikaj artikoletoj.